



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 9/10
1971

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
37-a (42-a) jaro
Monata

PROLOGO

*Al la 60-jara jubileo de NEL
dum la 42-a Norvega Esperanto-
kongreso en Trondheim 1971.*

Sesdek jarojn
sub signo stela
fronte de nia afero!
Sesdek jarojn
da strebo sema
obstine en firma fido!

Bomboj parolis,
kaj blekoj barbaraj
frapis la mondon muta.
Sed bomboj kaj blekoj
ne baras la penson,
ĝi pasas trans landaj limoj.

Bonvenon, gefratoj,
por festi la fondon
kaj servon dum sesdek jaroj!
Saluton, gastoj,
sur grundo grava
de sorĉa saga-susuro!

— — —
El kio venis tiu nova sento,
la fulma penso de junul-aŭdac'
kiu nin pelas, genton apud gento,
obstine marŝi sen kapitulac',
kiu nin trudas, kontraŭ la
«prudento»,
ankoraŭ kredi je tutmonda pac'?
Troviĝas iu nesondebla fonto
trans la prudenta homa horizonto

— — —
Ne estas ja nur signoj de prospero
ĉe nia sesdek-jara jubile'.
Sed jam sekura staras la afero,
ĝi pasis la stadion de ide'.
Batadas takte sur la tuta tero
cent mil da koroj de la pac-arme',
kaj NEL jam firme en la fronto
elstaras kiel la norvega monto.

Laboro liga ne signifas troni
supere en brilado de la glor'
Laboro liga estas daŭre droni
en urĝaj taskoj en ofic-deĵor'.
Laboro liga estas ade sproni
dormemajn klubojn por la eklabor',
alporti vibron de la vigla voko
ĝis plej malgranda kaj soleca loko.

Hodiaŭ ni festene panegiras pri pioniroj kaj farita far'. Sed nia pacarmeo plu jam iras kaj vokas nin al servo de l' homar'. La mondo baraktanta plu sopiras - sen falsa diplomata pacdeklar' paroli hom' al homo trans la limoj per veraj vortoj, ne per multaj mimoj!

EAH

Esperanto en Hyde Park -

Johan Matland, Sauda,
ĉe Speakers Corner.

Vizitante Londonon oni kompreneble ne preterlasas la okazon fari viziton en la fama «Hyde Park» kun la angulo de parolantoj. Tie ja ĉiuj rajtas paroli pri ĉio — Unu el la partoprenantoj de la UK — Johan Matland el Sauda — pensis: Kial ne kapti la okazon en Hyde Park pledi por Esperanto? Kiel pensite, tiel farite! Li iris en la parkon, ekstaris sur kesto kaj ekparolis. Tuj nombro da scivol-emuloj ariĝis ĉirkau li — kaj kiel kutime iu kaj alia inter la publiko aŭdigis demandojn kaj interĵetis rimarkigojn — Kaj Matland trafte respondis kaj argumentis —

Li substrekis la lingvan imperialismon flanke de la angloj kaj pledis por la internacia lingvo Esperanto kiel solvo de la mondo lingva problemo. Li skizis mal-longe la regulan konstruon de Esperanto kaj por montri la facilecon de la lingvo li finis per jenaj frazoj:

La pioniroj nun de ni postulas la grandan verkon gardi sen hezit'. Ankoraŭ junaj koroj fajre brulas, kaj vivas plu la pionir-spirit', la bonaj fortoj jam je ni kalkulas sur nia kampo de la pac-milit'. Ni estas roto de gerila rondo, tre fore, jes, sed meze en la mondo!

«Esperanto estas la sola solvo de la internacia lingva problemo. Laboru por la enkonduko de la lingvo en la tuta mondo —» Estis iniciato sendube sukcesa.

oto

Espista Renkontiĝo en Lejpcigo

Esperantista Renkontiĝo dum la Foiro en Lejpcigo (GDR) okazos la 11.3.1972 en Klubo de la Inteligentularo «Gottfried—Wilhelm—Leibnitz», 701 Leipzig, Elsterstr. 35 je la 19,30-a horo. Vizitu la Esperantistojn en Lejpcigo!

KALENDER med tegninger
av tsjekkeren V. Sestak.

Historiske motiv fra
Haugesund og Karmøy m. v.
Tekst også på Esperanto.

Passer til julegave.
Pris kr. 20,00

Henv. Esperanto-klubben,
boks 59, Haugesund.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

ranta agado. Ankaŭ multaj aliaj samideanoj tion faras.

Nun vi montru ke vi deziras apogi ilin en ilia grandanima kaj valora laboro por nia komuna afero!

Anoncu vin kiel donacanto de 100 kr. ĉiujare dum tri jaroj. Ni realigu la celon: 30 000 kronoj por la movado en Norvegujo! La unuaj du jam sin anoncis: Trygve Reiserter el Odda (kiu elpensis la ideon) kaj la subskribinto

Elna Matland.

Nekrologoj

Magnhild Undset forpasis

Antaŭ kelkaj jaroj N.E.L. ekhavis novan rektan membron en la koro de Hedemarken. Ŝia nomo estis Magnhild Undset. Ŝi konsideris sin tro maljuna por lerni, ŝi respondis: «Skroget er 90, men man er jo ikke eldre enn man føler seg!» Ŝi vere flamiĝis por nia ideo kaj fariĝis unu el niaj plej fervoraj propagandistoj, parole kaj skribe, per leteroj kaj en la gazetoj. Ŝi estis verve fervora, ne estante tamen fanatika, bonkora kaj aminda. En Oktobro 1971 ŝi forpasis, sed ŝia memoro longe restos inter ni. Post longa kaj aktiva vivo en la servo de la bono kaj la progreso ŝi ripozu nun en paco.

C. Støp-Bowitz.

Daŭr. p. 117

Kie troviĝas la oferemaj esperantistoj?

Karaj gesamideanoj norvega!

Nia norvega esperanta movado bezonas monon.

Ĉu vi estas vola oferi ion?

Nia plano estas starigi kapitalon sumanta je 10 000 kr. ĉiujare dum tri jaroj. Do entute 30 000 kronoj.

Fantazio kaj revaĵo? Tute ne.

Ni imagu al ni ke troviĝas en Norvegujo almenaŭ 100 samideanoj kiuj volas donaci po 100 kronojn ĉiujare dum tri jaroj. La rezulto estas monsumo kiu donos relative grandajn eblecojn por nia agado kaj propagando.

Ni ĉiuj scias ke la situacio por Esperanto en Norvegujo ne estas bona kaj kontentiga. Ni ankaŭ scias ke niaj estraranoj en N.E.L. ĉiuj faras grandan laboron, oferas tre multe de sia tempo por espe-

SCIIGOJ DE N.E.L.

Kursoj. Ĉiuj kluboj, kaj precipe tiuj, kiuj ne sukcesis starigi kursojn dum la aŭtuno, devas absolute aranĝi kurson por komencantoj dum la venonta printempa jaruono. Ankaŭ rektaj membroj povas sukcese aranĝi kursojn. Estas jam tempo plani la kursojn por la venonta printempa sezono. Sen kursoj neniuj progresoj!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbopremion de kr. 5,00, kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I kr. 23,00, parto II kr. 25,00, ambaŭ partoj kune kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, 19,00, 32,00.

Gazeta kurso. Klopodu igi gazeton en via loko aperigi nian gazetan kurson. Ĝi estas nun havebla ankaŭ por gazetoj ofsete presataj. Petu al N.E.L. pri regularo kaj provleciono.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por kluboj. — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi sian kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba alvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jaruono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

La Liga Estraro.

Daŭr. de p. 115

Anders Strai forpasis.

La 21an de Oktobro forpasis en Mandal pensiita lernejinspektoro Anders Strai, dum multaj jaroj unu el la pli aktivaj esperantistoj en Mandal.

PREMIOJ ELIRIS

La partoprenantoj de unu el la kuponleteroj sendis siajn kuponojn. La premioj estas senditaj al la gajntintoj.

De tempo al tempo nova kuponletero iras sur sian rondvojaĝon. Akceptu ĝin bone — kaj rapide!

LA KONTORFONDAĴO

Pli frue	kr. 808,00
A. Refsing	» 200,00
S. Korstvedt	» 10,00
C. S. B.	» 10,00
P. Hillestad	» 5,00

	kr. 1 033,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

EĈ EL RUMANUJO!

De tempo al tempo alvenas al la redakcio kolektitaj kaj vendotaj poŝtmarkoj. Ni ricevis eĉ el Rumanujo poŝtmarkojn. Joan Sirbu, Bul. Lenin 92, Sc.C.Ap. 8, Brasov sendis valorajn pm., kaj ni kore dankas.

Ni scias, ke plurloke oni estas kolektanta pm. por nia celo. Nun

iaj ricevitaj pm. estas lavitaj kaj venditaj/vendataj. La plej valorajn ni ja provas vendi unuope aŭ en kajeroj.

La redaktoro aĉetis belan albumon, en kiu troviĝas la plej valoraj kaj la plej belaj pm. donacitaj al la gazeto. Tiu albumo ĉiam ĉeestas en la kunvenoj de la filatelista klubo, kie la redaktoro havas Esperantan butikon.

Recenzoj

PIV

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Ĉefredaktoro prof. G. Waringhien, prez. de Akademio de Esperanto. Eld.: SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris 30. 1970. 1344 p., bindita. Prezo: \$ 26,10.

La unua granda mejloŝtono estis PV, la vortaro, kiun uzadas ĉiu konsciencie laboranta esperantisto. Sekvis alia, kiam aperis la Suplemento, tre necesa aldono post paso de jaroj. Dume ni atendis la finan mejloŝtonon, kiu nomiĝas Plena Ilustrita Vortaro, kaj kiu estos konata nur kiel PIV. Ĝi aperis 1970, kaj mejloŝtone elstaras en la Esperanta leksikologia literaturo. Fine ni povas kompari kun nacioj.

Se la libro ne aspektas kiel mejloŝtono, ĝi almenaŭ ampleksas brike. Ĝi havas 1344 paĝojn. Sur tiuj paĝoj estas kolektita, per mal-

grandaj sed netaj kaj klaraj literoj, tiom da scio el ĉiaj sferoj de la vivo kaj de la reala mondo, ke ĝi taŭge kovras la bezonon de ĉiu. Kiam mi informas, ke 69 diversaj vinjetoj simbolas la plej diversajn semantikajn aferojn, tio sola povas esti sufiĉa indikilo pri la amplekso de la signifosferoj. Kiam mi aldonas, ke la libro enhavas ĉ. 17 000 kapvortojn, kaj ĉiu komencanto scias, kiel oni povas en Esperanto fari novajn vortojn helpe de afiks-
oj, tio devus konviki ĉiun esperantiston pri la utilo de la libro kaj ĉiun neesperantiston pri la taŭgeco kaj seriozeco de Esperanto kiel lingvo ĉiel uzebla.

Ŝajnis al mi neĝuste recenzi PIV tuj post la ricevo. Nur la praktika uzado dum kelka tempo povas doni al la recenzanto la bezonatan materialon por kritiki. La sola malavantaĝo ja estas, ke la materialo fariĝos tro granda por relative mallonga recenzo. Estante recenzo pri Esperanta verko, ĉi tiu recenzo ja estas vere longa, sed la kaŭzo estas, ke PIV estas granda evento.

Unue ni konstatu, ke PIV multe superas al PV. Tio koncernas ne nur la vortotrezoron, sed ankaŭ la difinojn kaj precipe ekzemplojn, kie la koncerna vorto sin trovas en kunteksto — ĉi tiuj ekzemploj estas grave plimultigitaj. La alfluo de novaj vortoj ne povas ne kolori ĉiun ajn vivantan lingvon, tiel ankaŭ Esperanton. Kaj ĉar la Internacia Lingvo vivas sian propran, internan «vivon», ekestas ankaŭ idiotismoj, vortoj specifaj

por Esperanto, eĉ kreitaj el Esperantaj elementoj, kiel ekzemplo *adasismo*, aŭ slange naskitaj, kiel *krokodili* («paroli nacilingve en esperantista medio»). Tiuj du vortoj ja eniris la paĝojn de PIV.

Personaj kaj geografiaj nomoj ankaŭ — fine! — invadis la leksikonon. Oni lasis la finaĵojn -a al la virinaj nomoj, kaj eĉ aldonis tiun finaĵon (al grekaj nomoj), ankaŭ kiam la origina finaĵo estas o, ekz.: Erato, kiu fariĝis *Eratoa*. La procedon defendas la fakto, ke la o estas longa en la greka. Beethoven fariĝis *Betoveno*: la ekzemplo montras, kiel PIV traktas nomojn, kiuj estas tutmonda posedaĵo. La norvegoj vane serĉus la nomojn Ibseno kaj Nanseno.

Geografiaj nomoj norvegaj estas ege malmultaj: Oslo, Kristiano, Finmarko kaj Norda Kabo. Sed oni ne aludas, ĉu la adjektivo de Oslo estas *osla*, kiel preferas — kaj tute logike — la nenorvegoj, aŭ la pli provinca *osloa*.

Kiel sola hirundo Finmarko reprezentas la norvegojn guberniojn. Kial estas elektita precize ĝi? Ĉu pro la grandeco? Ĉu pro la facila esperantigeblo? Sed la same granda Hedmarko kaj la same facile adaptebla Telemarko ne ĉeestas. Tamen *telemarko* troviĝas en PIV, kaj signifas lertan svingturniĝon en skiado, uzatan por ŝanĝi la direkton aŭ rapide halti. Norda Kabo estas malĝuste indikita kiel la plej norda punkto de Eŭropo.

Siatempe mi korespondis, koncerne la Esperantan mondmapon,

kun s-ro Tibor Sekelj pri la itala urb-nomo Firenze (kiu ne estas sur la mapo). Tre ofte oni trovas en Esperanto la latinecan formon de la nomo *Florenco*, kiel indikas ankaŭ PIV. Tiu estas ankaŭ la formo de la nomo en la lingvoj germana, franca, angla kaj dana, kio tamen ne estu direktilo por Esperanto. Almenaŭ s-ro Sekelj kaj mi samopinias pri la preferindeco de la formo *Firenco*.

Tre kontentige estas, ke la geografiaĵoj estas akompanataj de siaj mapaj koordinatoj, Tio estas, kiel diras la Ĝenerala Antaŭparolo, la sola logika kaj internacia sistemo.

Strange estas, ke NATO ne estas menciita, eĉ ne en la listo pri ordinaraj mallongigoj, dum ja Eŭratomo ĉeestas.

Same strange estas, ke Bahaismo kaj same Oomoto ne estas menciitaj, kvankam ĝuste tiuj du religiaj movadoj havas fortan ligilon kun la Internacia Lingvo.

Tre bedaŭrinda afero estas, ke D-roj Paul Neergaard kaj C. Støp-Bowitz, la plej grandaj spertuloj pri botaniko kaj zoologio en la Esperanta mondo, estas nepre mal-kontentaj pri la multaj fuŝaĵoj en la terminoj de tiuj du fakoj. Nur en zoologio estas proks. 300 fuŝaĵoj, kvankam la ĉefredaktoro kaj neskribinto de la manuskripto, s-ro Caubel, tre skrupule demandis pri ĉiu eta detalo, kiun ili volis ŝanĝi aŭ aldoni, kaj tre lojale sekvis la decidojn de la fakulo. La du sciencistoj ne volas respondeci pri la fuŝaj ŝanĝoj kaj aldonoj, kaj

postulos eldonon de korektolisto, kiu bedaŭrinde ne estos bagatela.

Fine tio, kio pli ol io alia superigas la aktualan libron: la ilustraĵoj, kiuj pruntis sian nomon al la titolo. La ilustraĵoj, lerte kaj klare faritaj de s-ino Eva Støp-Bowitz (kun kiu ni jam pli frue aperigis intervjuon pri la afero) estas kolektitaj ĉe la fino de la Vortaro. Tio kompreneble havas siajn malavantaĝojn: la ilustraĵoj ne apudas la koncernen tekston, — sed same klare signifas avantaĝojn: la bildaro konsistigas apartan, preskaŭ memstaran, parton de la libro, uzeblan sendepende de la cetero, instrua kaj klariga. 7 platoj temas pri botaniko, 6 pri zoologio (la abunda materialo pri ĉi tiuj fakoj des pli bedaŭrindigas la fuŝaĵojn supre menciitan). Cetero estas platoj pri geologio/paleontologio, homa anatomio, geometrio/trigonometrio/stereometrio, arkitekturo, laboriloj kaj mezurinstrumentoj, optiko, meĥaniko, armiloj, muzikiloj, vestoj, veturiloj, aŭtomobiloj, flugmaŝinoj, ŝipoj. Kaj kompleta indekso pri la bildigitaj vortoj plivalorigas tiun parton de la libro.

La ĉefredaktoro de PIV, profesoro G. Waringhien, kaj lia lerta kaj diligenta stabo meritas dankon kaj gratulon pro la laborego, kiu dum jaroj forŝtelis ĉiun ilian liberton. Plej kontentige por ili devas esti la kontento de la nuna kaj de la morgaŭa esperantistaro, kiu ne plu povos malhavi la verkon. La nepoj vin benos!

Johan Hammond Rosbach.

Bona stilgvidilo

F. Faulhaber: Ne tiel, sed tiel ĉi. 2. eldono. Dansk Esperanto-Forlag, 1970. 64 paĝoj. Prezo 7,50 danaj kronoj.

La unua eldono de ĉi tiu libro eliris antaŭ 6 jaroj. Ĝi rapide forvendiĝis, kvankam eldonita je 2000 ekzempleroj. Jen la dua eldono, kiu estas reviziita kaj kelkloke reverkita.

Post enkondukaj vortoj pri tio, kio estas stilo, la aŭtoro tuj konstata, ke *bona stilo estas bonsona*, do ekzemple ne *studtempo*, sed *studotempo*: interpuŝiĝo de sonoj ne facile elparoleblaj estas evitinda. Same oni ne ripetu en kelklinia spaco iun sonon aŭ vorton.

En alia ĉapitro Faulhaber deklaras, ke *bona stilo estas klara*, kaj pritraktas la vortordon. Sekvas ekzemploj pri la konstato, ke *bona stilo estas simpla*, kaj en postaj ĉapitroj: *bona stilo estas logika*, *bona stilo estas varia* kaj fine: *estas en harmonia kun la temo*. Intermete la aŭtoro petas, ke la skribanto forĵetu balaston kaj evitu nenecesajn neologismojn.

La libro estas vere interesa. Ĝi ne nur seke diras, kiel ni faru, kaj kiel ni ne faru, sed per bone elektitaj ekzemploj ĝi donas gvidilon utilan kaj necesan. La ekzemploj estas dukolone aranĝitaj, tiel ke ni povas facile trovi — laŭ la titolo de la libro —: «ne tiel, sed tiel ĉi».

Ni forte rekomendas la verkon de Faulhaber al vi ĉiuj. JHR.

Teatro

«Ni ludas teatraĵojn» de E. V. Tvarozek. Dansk Esperantoforlag, Aabyhøj, prezo 4 d. kr.

Denove libreto por distrado en la klubvesperoj. La kvar teatraĵoj donas bonan okazon por la kluboj ekzerci la lingvon en neteda kaj amuza maniero. Precipe mi volas menciigi la trian skeĉon: «Samsortanoj», ĝi estas vere bonega kun la surpriza neatendita fino. Ĝi estas skribita surbaze de rakonto de la fama aŭtoro O'Henry, tio ŝajne estas tre bona kaj imitinda ideo, kaj mi konsilas al estontaj verkantoj de esperantaj skeĉoj utiligi niajn konatajn novelistojn por tiu celo.

«La Reto». Teatraĵo de Bukar (pseudonimo de Pariza samideano.) Dansk Esperantoforlag, prezo 4 d. kr.

Ĉi tiu teatraĵo estas vera drameto, la temo estas patrino kiu mense volas regi sian filinon. Estas interesa, ankaŭ streĉa ĝis la lasta momento. Mi estas tutcerta ke ĉi tiu teatraĵo kaptos la intereson de la publiko kaj tenos ĝin ĝis la lasta sceno.

Kvankam iom longa, mi ne dubas ke ĝi povos esti ludata en kluboj kaj grupoj, oni certe ekhavigos kompensojn por la laboro, ĝi estas valora teatraĵo.

Al la kluboj: Aĉetu du ekzemplerojn de ĉi tiuj libretoj, kaj ekzercu! Kutime estas nur du roluloj, kio tre faciligas la prezentadon.

Elna Matland.

Streĉa vojaĝo

De OTTO PRYTZ

Vojaĝado estas fenomeno ĉiam pli ĝeneraliganta. Plej ofte la vojaĝoj disvolviĝas laŭplane, kelkfoje ilin spicigas surprizetoj, kaj en esceptaj kazoj ili estas veraj aventuroj. Al tiu kategorio apartenas la vojaĝo, kiun mi faris en 1963 de la Esperanto-kongreso en Sofio al mia hejmo en norda Norvegujo.

Laŭplane mi devis forlasi Sofion per vagonaro sabaton tagmeze, alveni al Beograd la saman vesperon kaj veturi per alia vagonaro al Munkeno. Tien mi devis alveni dimanĉon posttagmeze, kaj tuj mi devis vojaĝi per ankoraŭ alia vagonaro al Kopenhago, kaj de tie al Oslo per kvara vagonaro, kiu devis ekiri lundon matene kaj alveni vespere. En Oslo mi devis viziti mian fraton, ĉe kiu mi estis lasinta kelkajn pakaĵojn, kiujn mi intencis kunporti al mia hejmo. Ĉar mi iom famiĝis okaze de mia abiturientiĝo en 1963, iu donacis al mi aviadilan vojaĝon de Oslo al Bodø, kaj tiun vojaĝon mi devis entrepreni lundon vespere. Tiaj estis la planoj, sed la faktaj okazaĵoj estis tute aliaj.

En Sofio mi avertis unu el la organizantoj de la kongreso pri la horo de ekiro de mia vagonaro, kaj li promesis, ke oni veturigos min al la stacidomo. Sed ĉar unu horon antaŭ la ekiro ankoraŭ oka-

zis nenio, mi demandis alian kongres-aranĝanton, kiam mi estos veturigata. Li ne povis respondi, kaj eksiante la nomon de la avertito, li diris, ke tiu sinjoro verŝajne forgesis la aferon. Oni do devis provi per telefono havigi taksion aŭ alian liberan aŭtomobilon, sed tio ne eblis. Nur tri kvaronhorojn post la ekiro de mia vagonaro oni sukcesis trovi taksion. Tiu atendado dum preskaŭ du horoj estis la plej terura momento de mia vojaĝo. La konscio pri tio, ke foriras mia vagonaro, dum mi devas pasive atendadi, malesperigis min. Kiam fine venis la taksio, mi veturis per ĝi ĝis la jugoslava limo. Estis multekosta plezuro, sed tio ne gravis, ĉar mi havis multe da bulgara mono, kiun mi devis nepre elspezi antaŭ ol forlasi la landon. Kiel kuriozaĵon estas menciinde, ke la bulgara blinda esperantisto, kiu akompanis min en la taksio, dum la vojaĝo skribis al mi la rusan alfabeton en brajlo.

Ĉe la jugoslava limo oni diris, ke mia vagonaro pasis la limon antaŭ 25 minutoj. Kiel daŭrigi? Bonŝance ni trovis irankanojn, kiuj estis vojaĝontaj tra Jugoslavio kaj havis liberan lokon en sia aŭtomobilo. Mi ekveturis kun ili, kaj en iu loko mi eksciis, ke mia vagonaro estis tie 10 minutojn pli frue ol mi. Mia espero estis vere forta ĉe kruciĝo de nia vojo kaj la fervojo; tiu kruciĝo estis barita al ni, ĉar estis pasonta — mia vagonaro. Sed tiu espero malaperis, kiam la aventuro fariĝis duobla. Tio okazis, kiam ni devis veturi tra grenkampoj, kiuj

ja estis horizontala aven-turo. Tamen, al Beograd mi alvenis ĝustatempe por atingi la vagonaron al Munkeno, kaj mi firme kredis, ke la resto de la vojaĝo okazos laŭplane.

Mia kredo neniom valoris, ĉar la jugoslavo ne estas jugo-sklavo de la tempo. Ili sukcesis tiom malfruigi la vagonaron, ke kiam mi venis al Munkeno, jam estis forinta mia vagonaro al Kopenhago. Sed oni diris al mi, rapidu, ĉar baldaŭ ekiros vagonaro al Hamburgo. Mi rapidis, atingis la vagonaron, eksidis en la restoracia vagono kaj trankvile tagmanĝis. Tiam mi informiĝis, ke la fina stacio de la vagonaro estis Kassel. Mi ne tro ĉagrenis, ĉar almenaŭ la *direkto* estis ĝusta. Al Kassel mi alvenis proksimume je la 23a horo dimanĉon, kaj tie mi devis atendi dum du horoj antaŭ ol venis vagonaro al Hamburgo. Kaj tiu vagonaro venis de — Munkeno! Al Hamburgo mi alvenis frumatene, kaj post mallonga tempo mi per alia vagonaro daŭrigis la vojaĝon al Kopenhago, kien mi alvenis lundon tagmeze.

Sed por atingi mian aviadilon de Oslo al Bodø mi devis flugi de Kopenhago al Oslo, kaj tiel okazis, ke la vojaĝo, tiom karakterizata de malfruigoj, finiĝis per tro frua alveno al Oslo. Tio eĉ estis iom maloportuna, ĉar kiam mi sonorigis ĉe la pordo de mia frato antaŭ ol li min atendis, mi ĝenis lin kaj lian fianĉinon . . .

Restas nur mencii, ke la lasta parto de la vojaĝo okazis sen mal-

facilaĵoj. Sed kelkan tempon poste mi publike rakontis pri la vojaĝo, kaj al tiu rakonto iu reagis jene: «Vi havas vere viglan fantazion! Tiu historio pri la vojaĝo hejmen el Bulgarujo estas tre lerte elpensita!»

☞ PÅ NORSK ☜

RESOLUSJON TIL EEC

Under avslutningsmøtet på den internasjonale Esperanto-kongressen i London nylig, hvor det deltok over 2000 representanter fra over 40 land, ble det vedtatt å sende en resolusjon til EEC: «Kongressen konstaterer at språkvanskelighetene eksisterer i verden idag, at til tross for sterk utbredelse av nasjonalspråk er problemet ikke løst, at løsningen på det internasjonale språkspørsmål ligger i at man vedtar å bruke et felles nøytralt språk, Esperanto, og at mer enn 80 års bruk av dette språket har vist at det fullt og helt og på alle felter fyller de krav man har lov å stille til et internasjonalt kommunikasjonsmiddel.»

ARBEIDSULYKKENE TEMA PÅ ESPERANTO-KONGRESS


«Arbeidsulykkene ifølge forskjellige lands lover (med konkrete tilfeller)» var et av de mest interessante emnene på årets internasjonale Esperanto-kongress, som nylig ble holdt i London. Det var

Daŭr, p. 124

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



(Daŭrigo)

Ĉar la Tokaydo-ekspreso estas la sola en la mondo de tiu tipo, la inĝenieroj ege penas por elpensi tiel bonan sekuresistemon kiel eble. I.a. oni prizorgis ke estu sufiĉe granda spaco inter la trakoj por ke 2 trajnoj sekure povu preterpasi unu la alian kun rapideco de 225 km. po hore. Estas 50 trajnoj, ili ĉiuj teleregadiĝas de Tokyo. De grandega trakpanela regadejo la teknikistoj akurate akompanas ĉiun trajnon kaj kontrolas la pozicion. Se necesus, oni povas de la centralo en Tokyo haltigi trajnon survoje. La trajnoj ankaŭ estas ekipitaj per tute aŭtomataj bremsoj. Se la rapideco superiras 225 km. po hore, ekfunkciigas aŭtomate ĉiuj bremsoj kaj la rapideco reduktiĝas ĝis 210—220 km. po hore. La trajnoj veturas kun 20—30 minuta interspaco. Komence, kiam la trafikgvidantoj ne estis certaj kiamaniere ĉio funkciigu, okazis kelkaj malfruigoj. Povis esti ke okazis kelkaj teknikaj eraroj kaj ke la deĵorantoj ne kutimiĝis al la novaj aparatoj sed ĉar la Japana Ŝtata Fervojo repagas la duonon de la biletprezio se trajno malfruigas pli ol 10 minutojn, oni faris grandajn progresojn dum la unua jaro. Sed nun jam de longe ĉio bone funkcias, oni regajnis la kostojn, kaj la projekto ĉiukaze donis profiton.

La trajnoj kaj la linio estas konstruitaj tiel ke estas ne-eble por memmortigantoj elŝalti. Ne eblas por sabotistoj iri en

la ŝpuro. En Japanio estas problemoj, nome ke ĉiujare proksimume 1100 personoj ĵetas sin antaŭ trajno. Laŭ la 5515 km. longa distanco ne troviĝas eĉ unu danĝera transtraka pasejo. Diversaj neatenditaj problemoj kompreneble aperigis, i.a. amasoj da paseroj. La birdoj estis kutimiĝantaj resti en la trakoj de aliaj linioj kie la trajnoj veturigis pli malrapide, kaj nun ili ne sukcesis forigi sin sufiĉe frue. Sed supozeble ankaŭ ili lernis. Estas preskaŭ certe ke en Japanio post kelkaj jaroj veturos ankoraŭ pli rapida trajno. Japanaj fervojekspertoj ekperimentas pri aerkusentraĵo kiu veturos kun rapideco de 5—600 km. po hore kaj per ĝi, la vojaĝo inter Tokyo kaj Osaka daŭros 70 minutojn. Ĉi tiu trajno veturos laŭ propra ponto situante 10 m. super la tero kaj oni esperas provveturigi ĝin proksimume en la jaro 1975.

FERVOJISTOJ!

Poŝtmarkojn uzitajn por «Norvega Esperantisto» oni povas sendi per deĵorposto al St.form. I Odd Kolbrek, Vogn-driften, Lodalen, Oslo Ø, kiu zorgos pri sendato al la redakcio en Sarpsborg.

Red.

La Italaj Ŝtataj Fervojoj modernigis sin.

Sur la «SETTEBELLO» (bela sep) (luksa modernega trajno konsistante el sep kuligitaj vagonoj) oni starigis laste «Hostesse»-servon.

Daŭr. de p. 122

den internasjonale Esperanto-for-ening av jurister som arrangerte møtet, som samlet mange interesserte fra en lang rekke land.

POPSANGER SYNGER PÅ ESPERANTO

Den kjente tyske popsangeren Udo Jürgens skal nå synge inn en plate på det internasjonale språket Esperanto. Platen er nå under utgivelse, og i den forbindelse har Jürgens uttalt at han «deziras al Esperanto multe da sukceso», hvilket vil si at han ønsker stor suksess for Esperanto!

SALMEBOK PÅ ESPERANTO

«Adoru kantante» er titelen på den internasjonale salmeboken som KELI (det internasjonale forbund av kristne esperantister) har gitt ut. Noter følger med, og salmene er utsatt for fire stemmer.

Sogneprest i Kristiansund, Hans Amund Rosbach, er representert med ikke færre enn 37 oversettelser av salmer. Rosbach har tidligere utgitt en egen salmebok på Esperanto.

ESPERANTOKURS I FARGE-TV

Som tidligere meddelt vil det nederlandske fjernsynsselskapet TELEAC sende kurs i det internasjonale språket esperanto fra nyttår av. Nå meldes det at kurset vil bli sendt i farger, 20 leksjoner, to ganger i uken. Fra Tsjekkoslo-

vakia blir det likeledes meldt om Esperanto-kurs fra nyttår i det slovakiske fjernsynet.

PARIS-TEATER VISER SKUESPILL PÅ ESPERANTO

Skuespillet «La reto» (Nettet) blir vist på teateret ABSIDOLE i Paris i tiden 16.11 til 5.12. Det blir ikke spilt på fransk, som man skulle tro i Paris, men på det internasjonale språket Esperanto.

Esperanto har vist seg velegnet som scenespråk ved de internasjonale Esperanto-kongresser, hvor det gjennom en årrekke har vært vist ypperlig scenekunst ved hjelp av det internasjonale språket.

Norvega Kroniko

Sauda

Nia klubo aranĝis Esperantan renkonton en Haukelisæter Fjellstue sabaton kaj dimanĉon la 25an de septembro. Ĉiuj kluboj de nia distrikto estis invititaj, kaj alvenis anoj de la kluboj en Bergen, Odda, Haugesund, Kristiansand kaj Sauda, entute 27 samideanoj.

Haukelisæter estas tre konvena por aranĝi tiajn renkontojn: Geografie bona pozicio, facile atingebla per aŭto, tre bela loko, bona (restadejo) tranoktejo kaj bona manĝaĵo. Estas la unua fojo kiam la klubo (kun ges. Matland kiel «primus motor» kaj iniciatintoj) aranĝis tion. La renkonto

fariĝis tre sukcesa kaj ĉiuj partoprenintoj esprimis dezirojn pri nova renkontiĝo venontjare.

La programo por la aranĝo estis varia kaj interesa. Sabatvespere post vespermanĝo ni rigardis filmon kaj lumbildojn de Londono kaj kongreso, kaj poste kantado, muziko, distrado, dancado. Dimanĉe je la 10a horo: Kunveno kiu pritraktis la impresoj de la kongreso en Londono, kaj pri la aŭtuna agado en la kluboj. Pri la kongresoj multaj opiniis ke ili estiĝis tro ampleksaj, ne tempo por privataj aferoj, estas ja kunvenoj de matene ĝis vespere preskaŭ ĉiutage. Ili ankaŭ opinias ke la kongresa kotizo estas tro alta.

Ni ankaŭ faris piedan ekskurson en la montaro en bela vetero, kaj la aŭtunaj koloroj en la pejzaĝo estis belegaj.

Je la 16a horo la lastaj partoprenintoj forveturis hejmen.

A. Bj.

Klubkunveno ĉe ges. Veka 22/10. Post kantado de «La Espero» nia prezidantino faris memorparolon pri nia klubano Robert Dyre kiu mortis la 9an de aŭgusto, 60 jara. Li lernis Esperanton jam kelkajn jarojn antaŭ ol nia klubo fondiĝis, kaj estas unu el la anoj kiu tre bone kaj flue parolis nian lingvon.

La vesperan parolon faris Johan Matland, kiu temas pri: 1971: «Internacia jaro de agado por kontraŭbatali rasismen kaj rasan diskriminacion» (Deklarita de U.N.) En sia parolo li ankaŭ menciis la lingvan diskriminacion, kaj opini-

is ke Esperanto estas la solvo. Poste li laŭlegis la du rezoluciojn aprobitajn en la Londono kongreso. Ili estas dediĉitaj al Unuiĝintaj nacioj kaj al Europa Ekonomia Komunumo. (EEC)

John Malmquist legis «Kiel mi fariĝis Esperantisto». Li estas ankaŭ unu el niaj klubveteranoj, kaj partoprenis esperantokursojn gviditajn de Nicolaisen, Østenstad kaj Johanson. Du foje li partoprenis esperantokursojn en Helsingoro, antaŭ kaj post la lasta mondmilito.

Post kafopaŭzo ni rigardis belajn kolorbildojn de la esperanta renkonto sur Haukeli-monto, kaj de Londono.

Finfine Norman Birkeli laŭlegis el malnovaj eldonoj de «Esperantobladet» pri nia klubo.

Seker.

Sarpsborg

La Urso, Sarpsborg. Kunvenas ĉiun duan merkredon. Ordinare okazas unue tabula instruado per desegnaĵoj. En unu kunveno la prezidanto parolis pri Picasso okaze de lia 90-jara jubileo, en alia kunveno li prezentis — en nia serio «La nova libro» — «La estiĝo de la tero kaj de la homo.» Parolante pri libroj, li informis, ke li sukcesis ĉe la Urba Biblioteko, kiu nun posedas PIV!

Kuponletero de la redakcio de Norvega Esperantisto estis programero, kiu enspezigis multajn kronojn al nia gazeto. Cetere la prezidanto pretigis bingoludon, kiun li uzas ne nur por la amuzo,

sed ankaŭ por havigi monon en la kluban kason, kaj por instrui pri la diversaj temoj de la ludo, kiu estas farita el poŝtmarkoj, kiujn la klubo aĉetis de Norvega Esperantisto. Ragnar Kjøningsen, kiu festis sian 70-jaran naskiĝtagon en septembro, ricevis stanan almetujon kun verda stelo kaj ĉizita gratulo, kaj la prezidanto dankis lin pro la fidela ĉeesto en la klobaj kunvenoj dum dudek jaroj.

Oslo

7/9.71. Kiel «Vortojn por pripenco» la prez. Annalise Rees legis la lastan strofon de la Zamenhofa poemo «Preĝo sub la Verda Standardo».

C. Støp-Bowitz legis inviton de Elna kaj Johan Matland, Sauda, al Esperanto-renkonto sur la Haukelimonto, sabaton la 25-an kaj dimanĉon la 26-an de septembro en Haukelisetter Fjellstue.

La ĉefpunkto de la programo estis raporto de L. Anjer pri la Universala Kongreso en Londono. Li priparolis la div. okazintaĵojn, oficialajn kaj distrajn. Precipe la Britan, Teatran kaj Kulturajn Vespereojn li tre laŭdis kaj trovis ilin eminentaj. Menciinde estas ke la FIAT Aŭtomobil-Kompanio donacis al la kongresanoj tre belan tekon por la kongres-dokumentoj.

Bedaŭrinde L. Anjer ne povis montri lumbildojn pri la kongreso, ĉar ili ankoraŭ ne estis pretaj, sed li montris tre belajn bildojn de Londono kaj ĉirkaŭaĵo, kaj ni esperas ke la kongresajn bildojn

L. Anjer bonvole montros je pli posta okazo.

Dum la programero «La membroj rakontas» nia propagandestro Thor Magnus Carlsen raportis pri sukcesa agado ĉe la gazetoj, i.a. Aftenposten publikigis lian artikolon pri Esperanto kaj la Komunista Merkato (EEC). Ankaŭ aliaj artikoloj aperis en la gazetoj lastatempe.

Tamiko Kaŭakami rakontis ke ŝi kun Annalise Rees kiel interpretisto vizitis lernejojn. Kune kun John Berggreen ŝi prezentis por la Oslo-gazetoj la eminentan japanan esperantiston K. Matuba.

Otto Prytz memorigis pri Esp.-konkurso en la svisa radio.

20/9.71. Dezirante koran bonvenon al ĉiuj ĉeestantoj, la prez. Annalise Rees precipe salutis nian japanan gaston Yuzuru Tsukihora.

Kiel «Vortojn por pripenco» la prez. legis ĉapitron de Arne Falk el la «Malgranda Ruĝa de la Virinoj».

John Berggreen raportis pri div. renkontiĝoj dum la Universala Kongreso en Londono: la Junulara Kongreso, la Infaneta Kongreso, la aranĝo por la skoltaj kaj la Oratora konkurso.

Annalise Rees rakontis pri div. kunvenoj kiujn ŝi ĉeestis: Vegetara, kvakera, turisma, ĵurnalista, aŭtomobilista k.a.

Dum la programero «La membroj rakontas» John Berggreen rakontis ke Marcella Rifling anoncis sin al la nova Esp.kurso. Menciinde estas ke ŝi estas fratino de

Bruno Rifling, kiu estis unu el la plej eminentaj esperantistoj siatempe, sed bedaŭrinde li mortis nur 23 jarojn aĝa. J. Berggreen ankaŭ rakontis ke 2 filmoj pri Norvegujo montriĝis dum la Londona Kongreso.

4/10.71. La prez. Annalise Rees malfermis la kunvenon, kaj kiel «Vortojn por pripenco» ŝi legis poemon de Henrich Heine «Miridas».

Ŝi ankaŭ atentigis la membrojn pri klubkunveno la 15-an de Novembro, kiam la Kultur-skabeno en Oslo faros prelegon, kaj ŝi admonis al multnombra ĉeesto.

Papita de Caspary parolis pri sia restado en Beitostølen Helse-sportsenter. Tre entuziasme kaj vigle ŝi rakontis pri la diversaj aktivecoj de la handikapuloj — ili gimnastikis, skiis, rajdis, naĝis k.t.p. Distraj vesperoj ankaŭ aranĝiĝis, kaj la klientoj mem prizorgis la programojn. Ofte la direktoro kaj kreinto de la centro, Erling Stordahl kontribuis al la distrado, kaj Stella de Caspary — la filino de Pepita — partoprenis la programon dum ŝia vizito la Beitostølen.

Post la prelego Pepita de Caspary montris tre interesajn lumbildojn faritajn dum ŝia restado en la Helse-sportsenter.

Dum la programero «la membroj rakontas» Ruth Herlofson atentigis pri artikolo pri Esperanto 31/7 en Stavanger Aftenblad, verkita de Johan Matland, Sauda.

Raportis *Harda Danielsen*.

Haugesund

MARA VENTO, Haugesund, okazigis sian unuan postferian kunvenon la 9an de septembro en la kutima ejo de KFUK. Bonvenigis la prezidanto esprimante la esperon pri bona kaj prospera agadsezono.

Programuloj de la vespero estis Arne Gram kaj Ole J. Rønnevik. Gram vive kaj interese rakontis pri la universala kongreso en Londono. Estis lia unua kunesto kun multlanda esperantistaro kaj kun atento ni aŭdis pri liaj impresoj kaj spertoj.

Rønnevik raportis pri la landa kunveno en Trondheim kaj la traktadoj kaj decidoj tie faritaj. Cetere estis priparolata la kurso-demando kaj interkluba Esperanta kunesto sur Haukeli.

Ankaŭ la oktobra kunveno estis ĉefe dediĉita al la UK kaj la kongres-urbo. Estis prezentataj du kolor-filmoj — unu kiun faris Sigm. Blichshavn kaj unu farita de Arne Gram. Ambaŭ filmoj donis interesajn fragmentojn el la kongreso kaj Londono. La programulojn dankis per kora aplaŭdo la ĉeestantoj.

Pri la sukcesa Esperanto-aranĝo sur Haukeli en septembro donis raporton Steffen Kjetland. Kiel kutime estis ellotado kaj oni priparolis kelkajn klub-aferojn.

Ref.

Anonco

La 13a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno (IFEFF) okazos de 5.—12.2.1972 en la fervojista sportdomo «Willi Merkl-Heim» en Spitzingsee. La loko situas en la Bavariaj Alpoj, proksime de fervoja linio München-Bayrischzell. Ek de la stacio Fischhausen-Neuhaus veturos speciala aŭtobuso 6 km al Spitzingsee (1100 m). Nombro de la partoprenantoj estos limigita je 60 personoj. Bv. peti informojn kaj aliĝilojn kontraŭ respondkupono ĉe S.ino Elfriede Kruse, D 6 Frankfurt (Main), Schweizer Str. 104 (Germanio).

Korespondu

Mi deziras korespondi kun vialandaj gesamideanoj. Mi estas komencantino, 20-jara oficistino, ŝatas sporton, muzikon. F.ino Junko Kosokawa, 6-4-11 Daimon, SIOJIRI-Nagano, P.N. 399-07, Japanujo.

F.ino Jaroslava Jandová, Skelná 12, Jablonec nad Nisou, CSR, 23-jara, deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn.

ĈU VI

provīs paroli al inteligenta persono pri Esperanto? Ĉu vi havas sufiĉe da argumentoj por rebati prudentajn atakojn?

PLIAJ DONACOJ

Lastatempe alvenis valoraj poŝtmarko-donacoj de ges-roj Rees, Oslo, de Mara Vento, Haugesund, kaj de s-ro Stefan Murak, Oslo. Koran dankon al ĉiuj donacintoj — kaj koran bonvenon al novaj donacintoj! Proksimiĝas la jarfino — kaj tiam la redakcio povos prezenti al la Estraro de NEL tre favoran ekonomian raporton — nur pro la kolektitaj kaj venditaj poŝtmarkoj. Se la kluboj mendos saketojn kaj disvendos ilin (tio estas amuza programero!), ni povos rapide enspezi pli da mono, kaj vi havos ŝancojn pri premioj!

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30
Turisma Servo: Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:
Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar